



# NEDERLANDA ESPERANTISTO

Monata Organo de la Nederlanda Esperanto-Asocio  
„La Estonto Estas Nia” - 33-a jaro, n-ro 4

Administranto: P. M. Mabesoone, Cort van der Lindenlaan 42, Harderwijk.  
Tel.: 0 34 10 - 36 11. Jara abono por ne-membroj: gld. 5,50. Por membroj senpaga.

Redaktoro: H. Groendijk, Pontanuslaan 7, Arnhem. Tel.: 0 83 00 - 2 66 99.

## Pri la komuna gazeto

La proponon faritan de pluraj sekcioj, dum la jarkunveno en 1967, nia ĉefestraro transdonis al la estraro de F.E.N. Sekve de tio estis decidite en kunveno de la tuta estraro de F.E.N. nomi komisionon, kiu esploros la eblecojn por aperigo de komuna gazeto. Por ke la laboroj plej efike kaj glate povu disvolviĝi oni decidis en la nomita kunveno elekti por la esplorkomisiono la prezidantojn de la kvar partoprenantaj organizoj (nome: F.L.E., L.E.E.N., N.K., kaj K.U.N.E.), kun la helpo de la redaktor(in)oj kaj kasist(in)oj. Por L.E.E.N. nur s-ro Calado partoprenis en la preparlaboroj. S-ino Lok-van Putten ne povis partopreni pro malsano kaj s-ro Groendijk deziras demeti la funkcion de redaktoro, kiel jam delonge konate, kaj pro tio preferis ne partopreni en la preparlaboroj.

En la unua kunveno de la esplorkomisiono estis decidite peti prezojn al presejoj (7 entute) pri jena gazeto. Formato: 29½ x 21 cm; kvanto da paĝoj: 16; kvalito de la papero proksimume tiu uzata por Laborista Esperantisto; frontpaĝo, se eble, kun foto kombinita aŭ ne kun ĉefartikolo; tuta eldonkvanto: 2600 ekzempleroj. LEEN: 2½ paĝoj; N.K.: 1 paĝo; KUNE 1 paĝo; ĝeneralaj informoj pri la Esperanto-movado: 2 paĝoj; lingva rubriko: 3 paĝoj (alterne 2 kaj 4 paĝoj); recenzoj: 1 paĝo, kaj por eventualaj reklamoj: 1 paĝo.

Krome la komisiono planis la eblecon presigi 4-foje jare la kvar eksterajn paĝojn en la Nederlanda lingvo, kun propagandaj artikoloj. De tiuj kvar paĝoj estos presataj ± 2500 ekzempleroj ekstraj, por uzado en nia propagando.

De kvin presejoj estas ricevitaj prezoj. Duan fojon la komisiono kunvenis por juĝi la ofertojn de la presejoj kaj dividi la kostojn inter la organizaĵoj. La prezoj de la presejoj estas tre variaj. Pri ili ni detale informos dum nia venonta jarkunveno. La supozata kosto por L.E.E.N. estos proksimume 20% pli alta ol tiu de Nederlanda Esperantisto.

Tio-ĉi estas verŝajne granda ofero por nia kaso, sed ni ne malatentu, ke tiam ni disponos pri ampleksa, belaspekta kaj valora gazeto.

Ni esperas ke per tiu-ĉi raporteto ni konigis al vi la plej gravajn faktojn kiuj rilatas la klopodojn por eldoni unu gazeton por la tuta nederlanda esperantistaro.

J. Calado,  
Aganta Prezidanto.

**La Asocia Jarraporto aperos kune kun la financa raporto k.t.p. en la maja numero de Nederlanda Esperantisto.**

*Ni klopodos aperigi ĉi tiun numeron kiel eble plej frue. Manuskriptoj atingu la redaktoron antaŭ la 10-a de aprilo.*

La redaktoro.

# ASOCIAJ INFORMOJ

Proponoj por la jarkunveno (25-5-1968)  
en Hotel Centraal, Stationsplein 9,  
Utrecht.

1. Por la vakanta prezidanto-loko venis unu nomo de kandidato. Rotterdam/Merkurio kandidatigas s-ron J. Calado, agantan prezidanton de L.E.E.N. La ĉefestraro transprenis la proponon kaj ankaŭ kandidatigas s-ron Calado.  
N.B. Por la vakanta loko pro ekziĝo de s-ro B. R. Beekhuysen ankoraŭ ne evenis nomoj de eventualaj kandidatoj.
2. Rotterdam/Merkurio proponas okazi en la kadro de L.E.E.N. tutlandan tuttagan renkontiĝon en la venonta somero en la centro de Nederlando.  
La ĉefestraro apogas la proponon.
3. Sekcio Hilversum proponas organizi marŝon en kunlaboro kun aliaj Esperanto-asocioj je iu konvena dato (ekz la tago de la Unuiĝintaj Nacioj) en unu el la plej grandaj urboj, dum kiu la partoprenantoj portu flagojn kaj tukojn kun sloganoj.  
Opinio de la ĉefestraro: Sukceso estos nur garantiita, se almenaŭ kelkaj miloj partoprenus, tamen ĝi subtenos la proponon.
4. Sekcio Zeist ensendis jenan proponon. La ĉefestraro de L.E.E.N. aranĝu karavanon al la Esperanto-Kulturdomo, Kastelo de Grésillon, apud Baugé, Francujo. La ideo estas, ke eventualaj kongresanoj de la Universala Kongreso en Madrid partoprenu en la karavanon kaj poste veturos al Madrid. Resto de la karavano restos en Grésillon por partopreni en la tieaj aranĝoj. Post la kongreso ili kune

reveturos al Nederlando.  
La ĉefestraro morale subtenas la proponon.

## Nova Esperanto-eldonejo

Wouter F. Pilger, konata pro siaj tradukoj de poemoj de P. C. Hooft kaj Francois Villon kaj jam dufoje gajninta premiojn dum Universala Kongreso (Budapest, 1966, kaj Rotterdam, 1967) fondis Esperanto-eldonejon „Vulpo”, Amsterdam.

Laŭ stencilo estas en preparo kelkaj novaj eldonoj: Amo kaj amoro, poemoj de P. C. Hooft, traduko de W. F. Pilger.

Barbara Allen - Anglaj kaj usonaj tradiciaj popolkantoj, kun muziko. Antologietoj de nederlanda poezio/Baladoj de Francois Villon/ktp. En „N.E.” de marto ni jam recenzis la unuan eldonon: „Ulenspiegel, tio estas strigspigulo”.

## KORESPONDPETOJ

Junaj esperantistoj el Rumanujo dez. kor. Letervespero okazos fine de majo 1968. Sendu leterojn al: Benedek Maria, SF. GHEORGHE, str. Berzei n-ro 14, Reg. Brasov, Rumanujo (R.S.R.).

Juna instruistino Janina BARTOSZKO, LODZ, Grówna 56-5, Polujo, dez. kor. Hobioj: bildkartoj, popolmuziko, turismo, rusa lingvo.

F-ino Kveta Kocourkova, 24-jara poŝt-oficistino, Vedomice 101, ROUDNICE nad Labem, Ĉeĥoslovakujo.

F-ino Helena Kocourkova, 30-jara teknikistino de medicino, Anglicka 7, TEP-LICE, Ĉeĥoslovakujo.

Salutu la 55-an Japanan Kongreson, 3-4 aŭg. 1968! Adr.: Sapporo-Tyûô-Kyoku Sisyobako 281, Japanujo.

James Thurber:

## La Unukornulo en la ĝardeno.

Iun sunan matenon viro sidis manĝante en la verando. Li suprenrigardis for de sia miksovaĵo kaj vidis unukornulon kun korno el oro, kiu trankvile staris mordetante rozojn en la ĝardeno. La viro supreniris al la dormoĉambro, kie lia edzino ankoraŭ dormis kaj vekis ŝin. „Estas unukornulo en la ĝardeno” li diris, „ĝi manĝas rozojn”. Ŝi malfermis okulon kaj malafable rigardis lin. „La unukornulo estas fabela besto”, ŝi diris kaj turnis la dorson al li. La viro malrapide malsupreniris kaj paŝis eksteren, en la ĝardenon.

La unukornulo ankoraŭ estis tie; ĝi nun staris manĝante inter la tulipoj. „Jen, unukornulo”, diris la viro, kaj li tiris lilion el la tero kaj donis tiun al ĝi. La unukornulo trankvile formanĝis la lilion.

Ĝoja pro tio, ke estis unukornulo en la ĝardeno, la viro supreniris kaj denove vekis sian edzinon.

„La unukornulo”, li diris, „manĝis lilion”. Lia edzino rekte eksidis en la lito kaj malvarme rigardis lin. „Vi frenezulas”, ŝi diris, „mi enkarcerigos vin”. La viro, kiu neniam opiniis tre delikataj la vortojn „frenezuli” kaj „enkarcerigi”, kaj dum tiel sunradia mateno, kun unukornulo en la ĝardeno, opiniis ilin pli sentaktaj ol iam, momenton pripensis. „Kuraĝu fari tion”, li diris defie. Li iris al la pordo. „Li havas kornon el oro, meze sur la frunto”, li ankoraŭ rakontis al ŝi.

Tiam li revenis al la ĝardeno por rigardi al la unukornulo: sed tiu ĉi iam estis

malaperinta. La viro eksidis inter la rozojn kaj ekdormis. Apenaŭ la viro estis forlasinta la domon, kiam lia edzino ellitiĝis kaj vestis sin kiel eble plej rapide. Ŝi estis forte ekscitita kaj ŝiaj okuloj brilegis. Ŝi telefonis al la polico kaj ŝi telefonis psiĥiatron; ŝi petis ilin veni rapide al ŝia hejmo kaj kunporti frenezuljakon. Policisto kaj psiĥiatro venis, eksidis kaj interesplene rigardis ŝin. „Mia edzo”, ŝi diris, „ĉimatenne vidis unukornulon”.

La policisto rigardis la psiĥiatron, kaj la psiĥiatro rigardis la policiston. „Li venis kaj rakontis al mi, ke ĝi manĝis lilion”, ŝi aldonis. La psiĥiatro rigardis la policiston kaj la policisto rigardis la psiĥiatron. „Li rakontis, ke ĝi havas kornon el oro meze sur la frunto”, ŝi diris. Je solea signo de la psiĥiatro la policisto eksaltis kaj ektenis la virinon.

Postulis multe da peno ekestri ŝin, ĉar ŝi furioze bataldefendis sin, sed finfine oni tamen superfortis ŝin. Oni apenaŭ havis ŝin en la frenezuljako, kiam la edzo eniris.

„Ĉu vi rakontis al via edzino, ke vi vidis unukornulon?” demandis la policisto.

„Kompreneble ne”, respondis la viro. „La unukornulo ja estas fabela besto”. „Dankon, tio sufiĉas”, diris la psiĥiatro. „Forkonduku ŝin. Mi bedaŭras pro vi, sinjoro, sed via edzino estas ĝisoste freneza”.

Tiel ili forkondukis ŝin, blasfemantan kaj kriaĉantan, kaj oni enfermis ŝin en frenezulejo.

La viro vivis ankoraŭ longe kaj feliĉe.

Tradukis: H. Groendijk.

Originala titolo:  
*The unicorn in the garden.*

res kaj Informa Servo de UEA).

## FERVOJISTA JUNULARO PLANAS KUNLABORON

Győr (Hungario) - La junulara sekcio de IFEF, la esperantista fervojistaro, nun konsideras pli intiman kunlaboron kun TEJO. Gvidanto de la sekcio, d-ro Imre Ferenczy, intencas proponi al IFEF i.a. regulan interŝanĝadon de delegitoj inter la du organizoj. La JS de IFEF organizos plurajn apartajn programerojn dum la IFEF-kongreso en Varna (Bulgario) de 11 ĝis 17 majo. Ili inkluzivos futbalan maĉon inter internacia IFEF-teamo kaj la loka junulara sporta unuiĝo.

### D-RO ZAMENHOF, ESPERANTO KAJ LA ESPERANTO-MOVADO

informas la komencanton koncize pri D-ro Zamenhof, la estiĝo de Esperanto kaj la Esperanto-movado.

STENCILITA, en kovrilo kaj ligita . . . . . f 0,50

Libro-Servo L.E.E.N., Borniastraat 95, Leeuwarden, Ĝirkonto 7 69 15.

## **NEDERLANDA ESPERANTO-ASOCIO „LA ESTONTO ESTAS NIA”**

Aganta prez.: Sro J. Calado, Vergeet-mij-nietstraat 25b, Rotterdam-12.  
Tel.: 0 10 - 18 94 81.

Sekr.: S-ino J. C. Heetkamp-Senstius, Hengelolaan 5f, 's-Gravenhage.  
Tel.: 0 70 - 66 96 69.

Kasistino: S-ino W. P. Lok-van Putten, Brederodelaan 36, Santpoort, (Z.).  
Tel.: 0 25 60 - 76 15.

Poŝtĝirkonto: 3 45 63 je la nomo de: Alg. Penningm. Ned. Esp. Ver.  
L.E.E.N., Brederodelaan 36, Santpoort-Zuid.

La esperantistoj eĉ ricevos profesian trejnadon antaŭ la maĉo: la konata hungara trejnisto Gusztav Rozgova proponis senpage siajn servojn.

**GEPATRA BULTENO** bezonas ankoraŭ multajn abonantojn, se ĝi daŭros tra la venonta jaro. La bulteno estas ligilo inter familianoj, kiuj uzas aŭ volas uzi Esperanton en la hejmo, kaj estas grave, ke ni kuraĝigu tiajn familianojn. Ĉiu numero enhavas leterojn, per kiuj la familioj povas interŝanĝi ideojn kaj spertojn. Oni ankaŭ eldonas rakontojn kaj kantojn por familia uzo.

La jarabono (14 steloj aŭ gld. 3,50) estas pagenda al U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, ROTTERDAM-2.  
Ĝirkonto 37 89 64.

### **MONDMAPO kun teksto en Esperanto**

La Instituto por oficialigo de Esperanto (Zetska 4-A-Beograd-Jugoslavio) eldonis MONDMAPON kun teksto en Esperanto kun ĉiuj nomoj laŭ la decido de la Internacia Komisiono por ordigo de geografiaj nomoj.

La mondmapo estas presita en grandeco de 100 x 70 cm. en 13 koloroj sur bona mapo-papero.

La prezo de la mondmapo en unuopa vendo estas \$ 1,— (unu usona dolaro aŭ egalvaloro en iu ajn valuto).

Ĉe mendo de almenaŭ 10 ekzempleroj la rabato estos 10%.

Por mendo de almenaŭ 50 ekz. oni havos 20% rabaton, por almenaŭ 100 ekz. 30% rabaton.

### **Leteroj de Zamenhof, III-a volumo**

Por kiel eble plej kompletigi la ĝisnunajn verkojn: „Originala Verkaro”, eld. 1929, kaj „Leteroj de Zamenhof”, eld. 1948, la

E-eldonejo J. Régulo (La Laguna, Hispanujo), intencas nun prepari sub la redaktado de s-ro R. Hauptenthal (Am Bahndamm 12, D-6603 SULZBACH, Germanujo) III-an volumon „Leteroj de Zamenhof”. Por tiu celo kolektiĝis jam ĝis nun ĉ. 500 dokumentoj. Se iu scias pri leteroj, poŝtkartoj, manuskriptoj aŭ aliaj dokumentvaloraj objektoj de d-ro Zamenhof, ankaŭ pri tiuj, kiuj jam aperis en diversaj publikaĵoj aŭ gazetoj, bonvolu kontakti kun la redaktoro, s-ro Hauptenthal. Tiamaniere oni kontribuos, ke la verko fariĝu kiel eble plej kompleta.

### **Internacia Esperanto-Feriosemajno 8-16 junio 1968 en Moenchsberghaus, SALZBURG, Aŭstrujo.**

Aliĝo ĉe: Turista Asocio „La Naturamikoj”, Stiegersgasse 6/22, A-1150, Vieno, Aŭstrujo.

F-ino Helena Kocourkova, 30-jara teknikistino de medicino, Anglicka 7, TEP-LICE, Ĉeĥoslovakujo.

Salutu la 55-an Japanan Kongreson, 3-4 aŭg. 1968! Adr.: Sapporo-Tyūō-Kyoku Sisyobako 281, Japanujo.

### **KAJ LA ESPERANTO-MOVADO**

D-ro Zamenhof, la estiĝo de Esperanto-movado.

• • • • • f 0,50  
95, Leeuwarden, Ĝirkonto 7 69 15.